


SUDFRANCIA STELO

N° 198 - 3a kvaronjaro 2011 - 3^{er} trimestre 2011



**Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono**



Nia aŭtuna kunveno okazis en Le Caylar kie la dudek partoprenantoj pasigis agrablan tagon, mi volas danki Hubert pro la amika akcepto, Francis kaj Arno por la posttagmeza programo. La preparado de la arta programo de IREM en Seto multe ŝuldas al Arno kaj « Flo » -Floréal Martorell kiu de jaroj agadas por ke nia esperanta kulturo vivas pere de asocio « VINILKOSMO ». Kiel vi legos en la sekvantaj paĝoj, okazis fajrego en la loko de la asocio- ni nun povas helpi al « Flo » per aĉetado de diskoj kiel li helpis al ni! La venonta numero de SFS aperos januare, intertempe ni renkontiĝos dum la du Zamenofaj tagoj en Béziers kaj Montpellier, poste eblos trapasi la NovJaraj Festoj en Esperantio en Grésillon. Frédéric Bourquin invitas nin en Nîmes por nia venonta federacia kunveno kiu okazos la 31an de marto 2012. J.F. Passarella.

Enhavo: vortoj de la prezidanto
P 2 : Protokolo de la Federacia kunveno
P 5 : Novaĵoj el niaj grupoj
P 6 : Du japanoj en Beziero
P 7 : Vojaĝo en Gvatemalo
P 8 : Château de Grésillon
P 9 : Le Journal Des Entreprises
P 10 : APE kaj Alter tour
P 11 : Staĝo en Kvinpetalo
P 12 : Kalendaroj 2012
P 14 : Vinilkosmo
P17 : Kien ni iros ?
P19 : Tibor Sekelj, Esperantista mondvojaĝanto

Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE
15, rue du Verdier 34120 TOURBES xianmoure@orange.fr
Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arno LAGRANGE

ESPERANTO-FEDERACIO de LANGVEDOKO-RUSILJONO

Federacia kunveno 15/10/2011

La 15an de oktobro 2011, de la 10a ĝis la 13a, okazis kunveno de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono en salonego en Le Caylar. Post komuna manĝo la ĉeestantoj povis spekti filmeton pri koncerto de JoMo okazinta en Le Caylar en aŭgusto kaj bildprezenton pri la vivo de Tibor Sekelj, Esperantista verkisto kaj mondvojaĝanto, kiu estas jubileota en 2012 okaze de la centjariĝo de lia naskiĝo.

1 bonvenigo senkulpiĝoj

Ĉeestas :

el Heraŭlto:

- el Le Caylar:

Hubert Martin (gastiganto)

- el CBE (Bitero):

Line Maurel, Jean-François Passarella (JFP, Prezidanto, Servian), Véronique Bichon (VB), Geneviève Gaubert, Geneviève Astier, Françoise Harnay,

- el Montpeliero:

Jeanine Bony, Josée Boccadifuoco, Martine Ragonnet, Monique kaj Serge Eysseric, Andreo Hoarau (AH), Joëlle Cuq

el Aldeo:

Jorgos (Georges Comte), Arno Lagrange (AL, Sekretario, Sigean),

el Gardo:

Frédéric Bourquin, Maria Pèrez y Sanz,

el Lozero:

Monique kaj Francis Bernard (FB, Espéranto-Info),

senkulpiĝas

Marlene kaj Arie Bouman, Laurence Esclapez, Louis Ensuque

prezidas Jean-François Passarella.

protokolas Arno Lagrange.

2 sinprezento

Ĉeestantoj kelkvorte prezentas sin unuj al aliaj (nomo, urbo, respondeco).

Tiuj kiuj vizitis niajn neĉeestantajn geamikojn raportas pri ties sanstato kaj personaj travivaĵoj: Pierre Taupiac (multe pli bone status), Georges, Marlene Bouman, Henryka Olek (finfine plu loĝos en Seto), Zohra naskis infanon.

3 Fina bilanco de IREM 20011

Departementa subvencio: 1450 €

Regiona subvencio = 0 €

Bilanco + 2651 €. Kiel interkonsentite la enspezita mono estas dividita inter la 4 organizintaj organizaĵoj, nome : Espéranto-France, SAT-Amikaro, Fervojistoj, Langvedoka-Rusiljona Federacio.

Al tio aldoniĝu la nekalkulebla helpo de la urbo Seto.

4 Someraj eventoj

- Bureso : Line kaj Geneviève kuiris por 16-o

- UK: partoprenis 5 federacianoj Lena, ge-Henin

- Malgrat de Mar: 4 partoprenintoj el la Federacio

- Le Caylar: 4an de aŭgusto, prelego de Hubert Martin pri Esperanto, de Jorgos pri siaj biciklaj vojaĝoj,

budoj, koncerto de JoMo kadre de manifestacio "Éloge du voyage lent"
- Vallon Pont d'Arc (Ardeŝo): 50-jariĝo de kampadejo Zamenhof
- Béziers: vizito de du japanoj Jasuo HORI kaj Toŝinobu ARAI ; turisma vizito de Narbonne kaj Béziers; ateliero pri kaligrafio kaj pri japana lingvo, prelegon pri Fukuŝimo ĉeestis 20 Esperantistoj kaj kelkaj ne-Esperantistoj, lastmomente organizitan. VB provizos fotojn, Line raportos por SFS.

5 Aŭtunaj eventoj

- Béziers : 3 novaj lernantinoj, multaj interesiĝis, 150 subskriboj por "Espéranto au bac "; subskribigis deputiton Loulou

- Montpellier: budo, multaj vizitantoj, 8 retadresoj, 1 novulino (rete lernos kaj vizitos la kurson temp' al tempe). Corinne Daudier kolektis pli ol 1000 subskriboj. Aliĝis Andreo el Reunio kaj amikino Diane trapasonta CAPES deziranta trapasi KER-ekzamenon de Esperanto.

Projekto prezenti la filmon de Dominique Gautier en Utopia en Montpellier (AH)

- Nîmes: budo, multaj vizitantoj, 15 retadresoj, 4 ĉeestis informkunvenon kaj fariĝis novaj lernantoj. La plej juna ĉesis pro studado.

- Lozère: les Ayres, Travailleurs lozériens budo; le Pompidou

6 Venontaj eventoj

• Zamenof-tagoj : sabaton 10an de decembro en Béziers, sabaton 17an de decembro en Montpellier

• Finjaraj renkontiĝoj : FESTego en Grezijono, JES en Gdansko, IF en

Xanten (Duisburg), NR kaj NIS en Bitburg, Alternativa jarfina programo en Herzberg

• UK Hanojo: 28/07 04/08 2012
• IJK Tenri Japanio 05-12/08 2012

• IS en Seto ne okazos en 2012 (krom se helpanto sin anoncus antaŭ oktobrofino)

• Mediteranea Esperanto semajno 25/2 - 3/3/2012 à Les Issambres (83)
<http://rodanalpa.federacio.free.fr/>

7 Raporto de Espéranto-France

- Espéranto-France proponos novan kontrakton kun federacioj (01/2012)

- ligado al reta versio de SFS

- renovigo de aliĝoj

- flagoj "Espéranto la langue équitable" po 12€ 50€/5 90cmX60cm

- Interkant' subvencipeto Karmen' post Ĝenerala kanto (Neruda/Teodorakis)

- interasocia kotizo (EoF/Fed/loka grupo) 20+2+15 (anstataŭ nuna kotizo por EoF=39; EoF provizas impoŝtatestilon

Kotizoj estas en Béziers: 15 en Nîmes 50 (inkluzivas SFS)

Kalendaro 2012 aperis nur en oktobro (de januaro al decembro); pli oportune estus havi lernejan kalendaron (septembro-septembro)

Landaj kongresoj okazos en St Aignan Grandlieu apud Nantes, 15-19 de majo 2012, kaj inter la 4a kaj la 12a de majo 2013 kun Fervojistoj en Artigues 33

2015: EoF estiel nacia organizaĵo relanĉas inviton por 100a UK en

Lille pri kiu NordFrancia Federacio estis rezigninta.

Komuna datumbazo EoF-EoJeunes?
SAT-Amikaro

8 Vinilkosmo

Post detruo de granda parto de la stoko de KD-oj de Vinilkosmo pro incendio eblas helpocele aĉeti difektitajn KDojn rabatpreze.

<http://www.ipernity.com/blog/39007/349653> : Subtena kampanjo al Vinilkosmo per mendado de savitaj diskoj / Campagne de soutien à Vinilkosmo

9 Pri Federacio

- SFS : papera versio, prezo ne plu dependas de kvanto, SFS senpaga krom kostoj por sendo 8€, grupoj transdonu nomon de aliĝintoj; prokrastigi retan disponigon

Retejo <http://esperanto-languedoc-roussillon.fr/> kreiĝis : la ilo kiu ebligas kunlaboran redakton " spip " estas ankoraŭ instalenda

Olivier prizorgos pri Montpellier.
Nîmes

<http://esperantonimes.wordpress.com>

<http://www.esperantoinfo.info>

- Aliĝoj al asocioj: al-iĝ-u !

10 Agadoj

- Espéranto au bac (<http://esperanto-au-bac.fr>): subsribigu ĝis septembro 2012; afiŝoj disponeblas

Jorgos : subsribigis la tiam novelektotan prezidanton de la Senato Jean-Pierre Bel; subskribigas urb(et)estrojn de kantoj en Arieĝo
Nun subskribis preskaŭ 15 000 el kiuj ĉirkaŭ 2450 perrete

FB aŭguste Les Ayres Alter-Tour

11 Venontaj jarkunvenoj

Ĝenerala Asembleo: 31a de marto 2012, en Nimo (Frédéric Bourquin prizorgos)

- renovigo de komitatanoj

En 2013 en Limoux: prizorgos Jorgos

12 Posttagmeze

- Filmeto de Alain Runel pri koncerto de JoMo okazinta la 4an de aŭgusto en le Caylar.

- Bildprezento fare de AL pri Tibor Sekelj, Esperantista mondvojaĝanto kaj verkisto, 1912-1988, eble la plej fama Esperantisto ekster la Esperanto-movado pro siaj verkoj tradukitaj al dekoj da lingvoj. " Esperanto Eŭropa Unio " proklamis la jaron 2012 "Jaro de Tibor Sekelj"



NOVAĴOJ EL NIAJ GRUPOJ

Jean-Pierre Lopez deĵoras en la budo en NIMO



Kiel ĉiun jaron, la **Esperanta Klubo de Nimo** partoprenis la asocian forumon, la 10an de septembro, sur la esplanado Charles de Gaulle.

Ĉi-jare, ni havis tendon kiu protektas nin kontraŭ la suno kiu estis varmega en tiu sezono. Claudine Coulomb, Lucas Perier Jean-Pierre Lopez kaj Frédéric Bourquin deĵoris laŭvice.

Ni ricevis multajn vizitantojn kaj dek kvar personoj donis al ni iajn adreson, telefonan numeron kaj retan adreson. Poste, ni organizis informan kunvenon ; kvar personoj venis kaj volas partopreni kursojn. Ĉi-jare, ni havos du kunvenojn semajne, en la asocia sidejo : Ĵaŭde, de la 10a 30 ĝis 12a por komencantoj ; Sabate, de la 10a 30 ĝis la 12a por konfirmatoj.

Nemoza esperantista klubo : 185 chemin du mas Bonnet tel 09 54 01 01 30

Interreta adreso : frederic.bourquin@laposte.net

TTT ejo : esperantonimes.wordpress.com

CENTRE CULTUREL

ESPERANTO MONTPELLIER

Contact : Serge Eysseric 0467598013

serge.eysseric@wanadoo.fr

KUNVENOJ 2011/2012

Jen la datoj de niaj monataj kunvenoj :

Sabaton la 8-an de Oktobro 2011

la 19-an de Novembro 2011

la 17-an de Decembro 2011

(Zamenhofa Tago)

la 14-an de Januaro 2012

la 4-an de Februaro 2012

la 17-an de Marto 2012

la 28-an de Aprilo 2012

la 12-an de Majo 2012

la 16-an de Junio 2012

La kunvenoj okazos de la 10-a ĝis la 14-a, ĉies-domo "L'Escoutaire " Rue des Razeteurs en Montpellier (Bus n°12)

Mi intencas inviti, okaze de la unua kunveno, la homojn kiuj petis informojn pri Esperanto dum la Asocia Forumo en Montpellier Antigone la 11-an de Septembro 2011. Amike, Serge

P.S. La Zamenhofa Tago en Beziers okazos la 10-an de Decembro.

DU JAPANOJ en BEZIERO



Dum du tagoj (de la 8a ĝis la 10a de Septembro 2011) la klubo de Beziero gastigis du japanojn : Hori Jasuo kaj Toŝinobu Arai.

La unuan tagon trajne ni iris al Narbonne. Tie ni vizitis la Katedralon (XIIa jc.). Ĝia originaleco estas evidenta : ene ni malkovris tre malnovan kaj neordinaran skulpt-tritikon. Ni eniris en la apudan ĉefepiskopan palacon, kiu entenas du muzeojn : arkeologio kaj pentraĵoj. Ni multe ŝatis la orientan salanon pro ĝiaj koloroj kaj ekzota etoso. Ekstere tute emociitaj la japanaj amikoj piediris sur la romana spuroj "la Via Domitia". Finfine ni piknikis fronte al la kanalo, kie trapasis nombraj turismaj boatetoj. Kia bela tago !

La duan tagon je la deka ni rendevuis antaŭ la teatro por viziti nian urbon. Tri eksteraj geamikoj akompanis nin. Unue ni eniris en la kapelon "Pénitents bleus", en kie ni vidis miniaturingitan malnovan militŝipon

fare de barelisto. Due irante sur mallarĝaj stratoj ni alvenis antaŭ la preĝejo "Madeleine". Tie en 1209 dum la krucmilito oni bruligis la loĝantaron de Beziero kaj la ĉefsoldato legato de la papo diris : "Mortigu ĉiujn, Dio rekonos la siajn".

Poste irante tra malnovaj stratoj ni eniris en la halojn konstruitajn laŭ la "Baltard" stilo. Tie la japanoj fotis, fotadis la fiŝ-elmontraĵojn. Ili miris pri la diverseco de la fiŝoj.

Trie la katedralo : de ĝia esplanado ni ŝatis la mirindajn pejzaĝojn : de la maro ĝis la pireneaj montoj. En la katedralo ni rigardis ĉefe la rozvitralon, kiu iluminas la barokan ĥorejon, kiam la suno subiras. Ankaŭ ni rimarkis belan orgenon, kiu belsonas ĉiudimanche vespere dum la somero. Ni promenis en la apuda klostro kaj en la episkopa ĝardeno, kiu superas la malnovan kvartalon kaj la riveron "Orb". Finfine ni alvenis sur la aleoj "Paul Riquet"

priombrataj de altaj platanoj. Ĉi-tie staras la statuo de la kreinto de la Suda Kanalo Pierre-Paul Riquet. Dum la posttagmezo en iu salono de la M.V.A. la du japanoj informis nin pri la 4 skribaj sistemoj. Post klarigoj kaj helpo ĉiu el ni povis skribi sian propran nomon kaj la vortojn, kiujn ni elektis : amo, paco, ĝojo, amikeco, solidareco. De la 18h30 multaj neesperantistoj partoprenis la prelegon : "Post Fukuŝima kaj la venonteco de Japanio". Kelkaj el ni tradukis el la

franca. Vidante la bildojn ili kaj la ĉeestantoj estis tre kortuŝitaj. Finfine ni kune iris vespermanĝi. Dum tiu manĝo la parolado estis agrabla. La morgaŭan tagon ili trajnveturis al "La Ciotat". Por ni, estas la aktiva tago dum la aleaj asociaj festoj. Multaj personoj subskribis la petskribon pri "Esperanto au Bac".

Subskribo C.B.E.

VOYAGE AU GUATEMALA

Voyage au Guatémala.

Bonjour, Je prévois d'organiser un voyage au Guatemala du 18 décembre au 1er Janvier 2012, avec possibilité d'extension d'une semaine du 1er au 7 Janvier et au Nicaragua/Costarica du 1er au 20 février. Il s'agit de voyages solidaires organisés en collaboration avec des indigènes qui ont déjà participé à l'organisation des précédents voyages depuis 2006. Pour plus de détails, veuillez me contacter.

Philippe Chavignon, MF du Plan 06470 Guillaumes,
Tel: 0493055198 /0688212334 werphatao@hotmail.com

Vojaĝo en Gvatemalo

Saluton, Mi planas organizi vojaĝon al Gvatemalo de la 18a de decembro ĝis 1a de januaro, kun eventuala kroma semajno de la 1a ĝis la 7a de Januaro kaj en Nikarakvo/Kostariko de la 1a ĝis la 20a de februaro. Temas pri solidaraj vojaĝoj organizitaj kunlabore kun indiĝenoj kiuj jam kunorganizis la antaŭajn vojaĝojn organizitajn ekde 2006. Por pli da informoj bv kontakti min:

Le 67ème congrès de SAT-Amikaro se déroulera à Châteauroux, au pays de George Sand, dans le Berry (département de l'Indre). Ce congrès aura lieu du 7 au 10 avril 2012 au lycée agricole Naturapolis à Châteauroux.

**Nacia kongreso (UFE) en Saint-Aignan (apud Nantes)
de la 25a ĝis la 29a de majo 2012.**

Pliaj informoj en postaj bultenoj aŭ ĉe www.esperanto-france.org

ESPERANTO-KULTURDOMO Château de Grésillon

Vidu nian belan masko-feston pasintjaran

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique26&#sal>

Venu kune festi dum la jarfina semajfino aŭ amuziĝi eĉ dum tuta semajno: ekde la 26a de decembro ĝis 2a de januaro 2012 Venu kun via tuta familio aŭ viaj plej bonaj geamikoj, ili bezonas koni nur 1 Esperanto-vorton: "fantomo". Por povi serene dancadi kun iu el la kastelaj fantomoj, masko-vestu vin kiel ili, diamant-brile aŭ dent-timige.

Prelegu pri sorĉitaj anglaj kasteloj aŭ alia temo **Loko**: Esperanto-kastelo Greziljono en urbo Baugé, 275 km sudokcidente de Parizo. Ni peras kunveturadon.

Informoj: <http://gresillon.org/jarfino>

Aliĝilo:

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique27>

Adreso: Esperanto-KulturDomo
Château de Grésillon 49150 SAINT
MARTIN D'ARCE France
Telefono-respondilo : 02.41.89.10.34
Retpoŝto : kastelo@gresillon.org

* * * * *

Kiam mi vidis la videofilmon de Katalin Kovats kie ŝi prezentis la ekzamenon KER, mi tuj komprenis la gravecon de ĉi tiu agado. Vera valida kaj oficiala ekzameno en la tuta Eŭropo kaj sekve en Francio ! Estis do urĝe trapasi tiun ekzamenon kiel eble plej rapide por doni al li nivelon de sufiĉa agnosko. Ju pli la nombro de ekzaminataj personoj estas alta des pli la diplomo estos agnoskata.

Mi decidis trapasi ĝin kiel eble plej frue. Pro timeto, mi iom dubis pri miaj kapabloj. Necesis al mi sekvi staĝon por altigi mian nivelon kaj havi veran preparadon al la ekzameno. Greziljono proponis tiun tipon de staĝo dum ferioj de aprilo.



Mi aliĝis kun iom da timo, sed la akceptema etoso de la kastelo, la kvalito de la kursoj de Christophe Chazarein kaj la afableco de miaj kamaradoj en kurso tre rapide igis tiun timon en vera plezuro. Mi ege rekomendas al ĉiuj tiun aventuron !

Corinne Daudier

**AVEZ-VOUS SIGNE ET FAIT SIGNER LA PETITION
POUR L'ESPERANTO AU BAC ?** www.esperanto-au-bac.fr

LE JOURNAL DES ENTREPRISES

Le premier réseau d'information économique en régions dimanche 30 octobre 2011.

Réseaux JDE Edition Ille-et-Vilaine 35
ENTREPRISE ESPERANTO fait des émules.

INSOLITE : L'association Entreprise Espéranto promeut l'utilisation de cette langue dans l'entreprise. Elle lance un appel à projet pour former les salariés. L'association Entreprise Espéranto a pour objectif de former des équipes de nationalités différentes à une langue commune, autre que leur langue maternelle: l'espéranto. Inventée en 1887, elle



l'étranger, souligne Philippe Bérizzi. L'anglais, c'est bien pour la communication externe. L'espéranto, lui s'adresse à tous: cadres, techniciens, ouvriers."

"Facila lingvo" Car, contrairement à l'anglais, la langue internationale s'apprend très vite, dix fois plus vite. "Elle est régulière, sa grammaire est sans exception, les règles de conjugaison sont minimalistes, c'est une langue phonétique qui est donc facile à apprendre". De quoi réconcilier les anciens écoliers que nous sommes avec les cours de langue, en mettant de côté les frustrations et les complexes. Car même si tous les salariés ont un jour ou l'autre pris des cours d'anglais (cadres ou ouvriers), tous ne le pratiquent pas également. Ils ont surtout, la plupart du temps, un niveau insuffisant pour une utilisation professionnelle technique. Communiquer en entreprise : Entreprise Espéranto lance donc un appel à projet à toute entreprise qui



revient sur le devant de la scène grâce à un appel à projet de l'association initiée par Olivier Clanchin (Triballat : <http://www.triballat.fr/>) et Philippe Bérizzi (Lingua Force : <http://www.linguaforce.com/>). "Nous savons que les entreprises ont parfois des problèmes de communication en interne, entre un salarié de la maison mère en France et celui d'une filiale à

souhaite faciliter les échanges entre un groupe de salariés multilingue. "Nous devons tester cet outil en entreprise pour l'adapter à tous les concepts, à tous les langages métier, explique Philippe Bérizzi. Pour l'instant, il est pratiqué en loisir par 2 millions de personnes à travers le monde". Les entreprises partantes pour le test offrent à un groupe de deux à six collaborateurs une formation à l'espéranto de 48 heures (deux fois quatre journées de 6 h). "Nous nous adressons à des entreprises qui veulent innover, souligne Lucas Le Provost, chargé de

mission chez Triballat, et espérantiste. D'autant qu'elles peuvent en tirer un côté humain et rassembler les salariés autour d'un projet". Une formation à 180 € HT par jour et par personne (avec une aide financière pour les candidats de l'appel à projet qui aideront à développer le concept). Entreprise Espéranto (*Noyal-sur-Vilaine*)
contact@entreprise-esperanto.org
Dossier de candidature sur
www.entreprise-esperanto.org

Virginie Monvoisin

ASOCIO POR ESPERANTO (APE)

Eble vi scias ke **Asocio Por Esperanto (APE)** organizis sukcesan renkontiĝon lastjare: Printempa Esperanto Kunveno (PEKO).

Kun plezuro mi anoncas al vi ke APE planas organizi la duan Beneluksan Kongreson en 2012. Ĝi okazos de sabato 28-a de aprilo ĝis mardo 1-a de majo proksime de Namuro, Valonujo. La du ĉefaj ideoj estas:

-krei internacian teamon por organizi kaj gvidi ĝin. Tiel tiu ĉi teamo estos

preta por organizi la trian Beneluksan Kongreson. Garantio de sukceso kaj daŭrigado.

-"Profesiiĝu, agu!" kiel temo
Jam notu tiun bonegan renkontiĝon en via agendo!

Nome de APE,

Doumont Valère
rue de Velaine, 114 bte 4
B-5060 Sambreville
doumontvalere@yahoo.fr
+32 485 517 552

ALTER TOUR

Nous avons passé une très agréable journée grâce à notre ami Hubert MARTIN qui a accueilli Alter Tour et l'espéranto durant la journée du 4 août au Caylar, sur le Larzac. Durant le matin, Hubert MARTIN a fait une conférence sur l'espéranto devant une cinquantaine de personnes, suivie d'une présentation par Jorgos de son ancien tour en vélo avec des espérantistes. En soirée, JOMO nous a donné un spectacle endiablé en une vingtaine de langues dont l'espéranto. Le matin, Jorgos avait dressé une très longue table pour présenter CD, livres et documents sur l'espéranto et une petite table, matin et

après-midi, appelait à signer l'appel pour l'espéranto au bac. Nous avons eu une cinquantaine de signatures.

Samedi 20 et dimanche 21 août, nous étions à la fête des travailleurs en Lozère, avec un stand de 6 mètres de long. Un petit parisien de 8 ans a passé l'après-midi à apprendre l'espéranto en revenant x fois ! ... Je n'ai pas encore compté le nombre de signatures. Le responsable du PC de Lozère a signé la pétition. Ce qui fait que la pétition a été signée, en Lozère, depuis le début de la campagne, par Jacques Blanc UMP, le président du Conseil général de Lozère (UMP), le maire de Mende (PS), puis maintenant Guy GALVIER (PC, conseiller municipal). Amicalement. Francis BERNARD

Près de 15000 signatures recueillies pour l'espéranto au bac ! (sat-amikaro 30/10/2011)

*L'espéranto
au bac !*
SIGNEZ

Esperanta kaj muzika staĝo en Kvinpetalo

Kiel kutime, de la 16a ĝis la 24a de aŭgusto, ni preparis la nutraĵojn por la staĝantoj. Dum la sama periodo, kvar geesperantistoj partoprenis en la staĝo biblioteko. Ni kune manĝis kaj babilis. Dek-unu personoj kantis kaj muzikis per diversaj instrumentoj: flutoj, akordiono, mandolino, gitaro. Matene, oni dispartiĝis en du grupoj: la komencantoj plibonigis sian gramatikon kaj redakto-kapablon kun Ansofi; la aliaj, kun Vinko, aŭskultis, diskutis pri seriozaj temoj: historio, muziko, biologio. Vinko prezentis al ni la etan amfiokson pri kiu, antaŭe, ni multe parolis kaj ankaŭ malgrandegan fiŝon: la gasterosteon. Por bone vidi la detalojn de la korpo, ni certe bezonus la mikroskopon de Vinko. Kiaj strangaj kaj interesaj bestoj!

Ĉi-jare, ni okupiĝis pri kantoj el diversaj landoj, ĉefe balkanaj, tradukitaj en Esperanto. Paralele, ni lernis originalajn verkojn de Lino de lia amiko Jean-Marie

Lemarchand.

Per multe da laboro, la gepraktikantoj, finfine, atingis bonan praktikon kaj altan nivelon. Dum la tuta staĝo, oni aŭdis muzikon en ĉiuj salonoj, ĉar ĉiuj deziris progresi. En la festa salono de la urbo, Lino donis tre agrablan gitarkoncerton.

Iun vesperon, Brian Moon prezentis per komputilo bildojn pri la staĝo 2010. Kia plezuro revidi geamikojn, kiuj pro laboro ne ĉeestis ĉi-jare! Alian fojon, Lino per akordiono akompanis sian patron Vjeko kiu kantis balkanajn kantojn. Ni multe ĝojis aŭskulti ilin.

Koncerto konkludis la staĝon. La publiko ŝatis la kvaliton de la laboro kaj la talenton de la artistoj. Kiom da laboro por ĉiuj, instruistoj kaj lernantoj! Tamen, kia plezuro bone kanti kaj ludi! Poste, ni manĝis kukojn kaj tortojn.

Dum la ripoza tago, ni veturis ĝis Civaux. Ni vizitis "la planedon de la

krokodiloj". En vasta loko, oni kultivas tropikajn florojn, arbojn, kanojn, ktp. En kvin basenoj, dormas aŭ malrapide naĝas krokodiloj el diversaj landoj. En kelkaj malfermitaj buŝoj, aperas la pintaj dentoj. Tiuj bestoj ŝatas manĝi homojn... kia danĝero se oni falus en la akvo! Kun granda bruo, du el ili frapis unu la alian per vosto. Oni nutras ilin per kobajoj aŭ similaj bestoj. Tamen, ili estas sategaj. Tre koloraj fiŝoj, etaj ŝarkoj promenis en la baseno. En akvario, beboj, infanoj de krokodiloj kviete kreskas pli kaj pli sub speciala hejta lampo. La ovoj estas sufiĉe dikaj. Malgraŭ la varmego, ni vizitis la nekropolon, la muzeon, kaj promenis ĉirkaŭ la lageto. Foje, post la manĝo, ni iris ĝis la tombejo de Bureso vidi la kolon kun serpento kaj kranio baze, ĉirkaŭita de kvar altaj cedroj. Ni rimarkis ke,

antaŭ la unua mondmilito, ofte la infanoj mortis junaj.

Iun nokton, la fortegaj ventoj, pluvoj kaj fulmotondroj vekis nin. Ĉu estis la fino de la mondo? Tamen, matene, la suno brilis, la varmo sekigis la kamparon kie la ŝafoj blekis, la sunfloroj rigardis la birdojn kiuj ekkomencis kuniĝi sur la fadenoj. Ofte, ni plukis rubusojn por kuiri tortojn.

La etoso estis tre gaja. Kiam la ĉeestantoj purigis la teleraron, ili kantis ankoraŭ kaj ankoraŭ. Ĉu eble la devizo de la staĝo estis "kanti laborante?"

Ni kuiris tre plezure ĉar ĉiuj ŝatis siajn kuirajojn. Oni diris al ni "mi tro manĝis, mi dikiĝis" kaj preskaŭ neniam ni havis restaĵojn. Ni konstatis, ke junaj aŭ maljunaj, ĉiuj manĝis kun la sama apetito. Do, ni revenos en 2012.

Line Maurel kaj Geneviève Gaubert

CALENDRIERS 2012 D'ESPERANTO JEUNES



kalendaro 2012

	januaro	februaro	marto	aprilo	majo	junio
lundo	2 9 16 23 30	6 13 20 27	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28	4 11 18 25
mardo	3 10 17 24 31	7 14 21 28	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29	5 12 19 26
merkredo	4 11 18 25	1 8 15 22 29	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30	6 13 20 27
ĵaŭdo	5 12 19 26	2 9 16 23	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31	7 14 21 28
vendredo	6 13 20 27	3 10 17 24	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25	1 8 15 22 29
sabato	7 14 21 28	4 11 18 25	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26	2 9 16 23 30
dimanĉo	1 8 15 22 29	5 12 19 26	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27	3 10 17 24
	julio	aŭgusto	septembro	oktobro	novembro	decembro
lundo	2 9 16 23 30	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31
mardo	3 10 17 24 31	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25
merkredo	4 11 18 25	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26
ĵaŭdo	5 12 19 26	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27
vendredo	6 13 20 27	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28
sabato	7 14 21 28	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29
dimanĉo	8 15 22 29	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30

Ne pas jeter sur la voie publique. Dankon!

Avec une rapide présentation sur la langue et quelques exemples de phrases, le petit calendrier «esperanto» est un support idéal pour une distribution en masse dans les

lycées ou universités, les foires et marchés... Les personnes demandent souvent plus d'informations, ce qui en fait un outil privilégié pour un premier contact ! Cette nouvelle édition conserve les atouts des précédentes : pliable, incluant une courte présentation de la grammaire de l'espéranto, ainsi que des phrases types, que les personnes peuvent analyser et prononcer, et qui piquent leur curiosité ; enfin, gratuit pour ceux qui les distribuent. Si vous désirez en recevoir quelques centaines (200 ? 500 ? 1000 voire plus ?) pour aider à leur distribution partout en France, n'hésitez pas à écrire à l'adresse suivante : kalendaroj@esperanto-jeunes.org ; mais attention : bonvolu nepre aldoni

L'espéranto ?

• Une prononciation claire : plus simple pour se comprendre

• Comme en français sauf :

c → ts j → y ĝ → dj ŭ → w
ĉ → tch ĵ → j ŝ → ch u → ou

• Une grammaire facile : progression rapide assurée

- Les **noms** se terminent par **o**
- Les **adjectifs** se terminent par **a**
- Les **adverbes** se terminent par **e**
- L'objet est indiqué par la terminaison **n**

• Une conjugaison logique : aucun verbe irrégulier

paroli	parler	ni parolis	→ passé
mi parolas	je parle	vi parolos	→ futur
vi parolas	tu parles	ili parolus	→ conditionnel
li/ŝi parolas	il/elle parle		

• Des suffixes innovants : moins de vocabulaire à apprendre

	métier	féminin	groupe
ŝaf ^o	ŝaf ^{isto}	ŝaf ^{ino}	ŝafar ^o
mouton	berger	brebis	troupeau
kant ^o	kant ^{isto}	kant ^{istino}	kantar ^o
chant	chanteur	chanteuse	répertoire

www.esperanto-jeunes.org/cours

frazon en Esperanto, car nous recevons des demandes fantaisistes de collectionneurs qui ont trouvé le lien vers notre site par hasard sur la

toile. Notre objectif est principalement la diffusion aux espérantophones et aux groupes espérantistes prêts à les distribuer aux non-espérantophones ! Merci d'avance pour votre compréhension et pour votre « disdonemo ».

Les calendriers coûtent 2000 euros à fabriquer et environ 1000 euros à envoyer aux différentes personnes qui les distribuent.

... la langue du monde !

► Une pratique immédiate : sympa pour communiquer

Bonan tagon. Kioma horo estas ?

Bonjour. Quelle heure est-il ?

Saluton! Estas la deka horo kaj dudek.

Salut ! Il est dix heures vingt.

Dankon. Ĉu vi parolas la italan lingvon ?

Merci. Est-ce que vous parlez l'italien ?

Ne, sed mi parolas la francan.

Non, mais je parle le français.

Mi vivas en Francio. Mia nomo estas Maria.

Je vis en France. Mon nom est Maria.

Estas agrable interparoli kun vi.

C'est agréable de discuter avec vous.

Jes. Ĝis revido!

Oui. Au revoir !

e ► Grâce à l'espéranto, tu peux :

- voyager différemment,
- participer à des rencontres internationales,
- découvrir d'autres langues et cultures...

... partout dans le monde,
sans barrière de la langue !

Esperanto-Jeunes

info@esperanto-jeunes.org

Cette année, comme depuis le début, nous ne faisons pas payer les personnes qui distribuent les calendriers, nous savons que les personnes qui ont du temps et les personnes qui ont de l'argent ne sont pas forcément les mêmes. Donc, si vous appréciez cette opération menée par Esperanto-Jeunes, n'hésitez pas à nous soutenir par un don. Merci pour votre générosité !

VINILKOSMO



www.vinilkosmo-mp3.com

www.vinilkosmo.com

Sendita: lunde 19a de septembro 2011 5:28

Gekaraj, hieraŭ nokte okazis katastrofo ĉe VINILKOSMO/ EUROKKA. La ekzercejo n-ro 7 kie ekzercis 3 rokaj bandoj kaj la stokejo de Vinilkosmo / EUROKKA (kie estis la sonsistemo, materialo por la studio stokita tie, instrumentoj kaj la plej granda parto de la stoko de la Ko-diskoj de Vinilkosmo) estis detruitaj pro incendio. Unu el la Bandoj ekzercis tie ĝis la 22an kaj verŝajne la incendio startis post ilia foriro, eble cigaredo malbone estingita aŭ ili ne malŝaltis la elektron forirante... mi ne scias, verŝajne la asekurkompanio faros enketon... Estas vera katastrofo por Vinilkosmo kaj EUROKKA kaj eĉ por la Studio de La Trappe ĉar ni perdis grandan parton de nia sonmaterialo kaj la diskostokon... La fajro-brigadistoj provis savi kion ili povis... kelkajn centojn da diskoj estis savitaj sed mi ne scias en kia stato estas tiuj kiuj saviĝis... mi devos ĉion kontroli ĉar ili varmiĝis kaj poste malsekiĝis pro la amaso da akvo... la tuta sonmaterialo estas detruita... La fajro-brigadistoj faris ĉion por ke la apuda registrejo kaj ripozejo ne fajriĝu kaj feliĉege ili sukcesis... la studio estis savita ...

sed la perdita materialo kruele mankos ... ekzemple mi ne plu povos sonreĝisori por koncertoj kiel mi faris ĝis nun por Festo kaj aliaj eĉ la materialo nova kiun mi aĉetis por lasta FESTO bruliĝis... feliĉe okazis neniu vundiĝo de personoj... Iom post noktomeze malŝaltiĝis la elektro kaj tiam mi ekserĉis la kialon subite mi kaj mia frato konstatis la fajron... sed jam tegmento brulis kaj ne eblis ion fari ni tuj vokis la fajro-brigadistojn kiuj alvenis 15 minutojn poste kaj laboris ĝis la 4a kaj duono...

Mi provos ripozi por pensi pli klare morgaŭ matene nun mi estas sub la ŝoko... Mi ne scias kio okazos en la venontaj tagoj ... Mi malaperos kelkajn tagojn sed mi provos informi vin kiel eble plej baldaŭ pri la sekvo kaj la konsekvencoj... ĝis amikoj... malfeliĉege Flo

Subtena kampanjo al Vinilkosmo per mendo de savitaj diskoj

Vinilkosmo lanĉas subtenan kampanjon post savado de sufiĉe bona kvanto da diskoj kiuj ne estis forbruligitaj, sed kies libretoj kaj ujoj estis difektitaj pro la akvo de la fajrobrigadistoj dum la estingo de la fajrego. Ni elprenis ĉiujn eblajn diskojn, purigis la ujojn, forĵetis kio ne estis konservinda kaj por ne forĵeti la sendifektajn diskojn ni decidis vendi ilin kiel savitaj diskoj subtene al Vinilkosmo je malalta prezo. Via subteno kontribuos al daŭrigo de nia agado por Esperanto-Muzik-Kulturo per novaj projektoj kaj eventualaj reeldonoj. Dankon al vi ĉiuj!

Ni povis pretigi du kategoriojn de savitaj diskoj por tia subtenkampanjo:

1.) La diskojn, kun ujoj, foje difektitaj, kaj kies libretoj estis malsekigitaj sed kiujn ni sukcesis savi kaj sekigi, ni disponigas je duonprezo (50%) de la publika prezo kun imposto + sendokostoj

2.) La diskojn en ujoj, foje duonrompitaj aŭ en plasta koverto, sen libreto, kiu entute perdiĝis, ni disponigas por 5 eŭroj + sendokostoj

Listo kaj kvantoj de la savitaj diskoj en kategorio 1 (kun difektitaj libretoj):

Referencoj / Albumtitoloj / Artistoj / KD-Kvantoj / Prezoj (50%)

- VKKD018 JoMo kaj Liberecanoj – JoMo - 28 KD : 6,50€
- VKKD020 ...sed estas ne. - Persone - 11 KD : 6,50€
- VKKD022 Por la mondo - Merlin - 11 KD : 6,50€
- VKKD023 Ŝako – La Porkoj - 47 KD : 6,50€
- VKKD024 Masko – Kajto - 40 KD : 6,50€
- VKKD026 Kia viv' – Kore - 30 KD : 6,50€
- VKKD044 JoMo friponas ! – JoMo - 46 KD : 7€
- VKKD053 Elektronika Kompilo - 58 KD : 9€
- VKKD070 Civilizacio – Strika Tango - 103 KD : 8,50€
- VKKD073 Mi estas – Ĵak Le Puil - 46 KD : 9€
- VKKD075 Rebela sono – Dolchamar - 8 KD : 7€
- VKKD082 JoMo slavumas – JoMo - 105 KD : 9€
- VKKD086 Supernova – SUPERNOVA - 11 KD : 7€
- VKKD088 Tielas vivo – Kore - 20 KD : 9€
- VKKD090 Invito por vojaĝo – Jacques YVART - 142 KD : 9€
- VKKD092 Eksplodigos vian domon – La Perdita Generacio - 70 KD : 7€
- VKKD093 Fek al Esperanto – La Pafklik - 7 KD : 8€
- VKKD023 Ŝako – La Porkoj - 47 KD : 6,50€

Listo kaj kvantoj de la savitaj diskoj en kategorio 2 (sen libretoj) je 5 eŭroj :

Referencoj / Albumtitoloj / Artistoj / Kvantoj

- VKKD020 ...sed estas ne. - Persone - 91 KD
- VKKD022 Por la mondo - Merlin - 30 KD
- VKKD026 Kia viv' – Kore - 28 KD
- VKKD027 Lingvo Intermonda – Dolcxamar - 6 KD
- VKKD053 Elektronika Kompilo - 42 KD
- VKKD070 Civilizacio – Strika Tango - 1 KD
- VKKD074 Plaĉas al mi – Kaj Tiel Plu - 10 KD
- VKKD075 Rebela sono – Dolchamar - 25 KD
- VKKD082 JoMo slavumas – JoMo - 33 KD
- VKKD086 Supernova – SUPERNOVA - 10 KD
- VKKD088 Tielas vivo – Kore - 93 KD

- VKKD090 Invito por vojaĝo – Jacques YVART - 73 KD
- VKKD092 Eksplozigos vian domon – La Perdita Generacio - 65 KD
- VKKD093 Fek al Esperanto – La Pafklik - 11 KD

Kalkulu kaj aldonu la sendokostojn :

Por Eŭropa Unio: ĝis 2 KDoj = 4,30 ĝis 4 KDoj 6,50 €, ĝis 5 KDoj 10,00 €

Por Novzelando, Aŭstralio, Kanado, Usono: ĝis 2 KDoj = 5,90 €, ĝis 4 KDoj 7,70 €, ĝis 5 KDoj 11,50 €

Por aliaj mondpartoj : ĝis 2 KDoj = 12€, ĝis 4 KDoj 15,80€, ĝis 5 KDoj 16,80 €

Kiel subteni ?

Por subteni nin dum tiu kampanjo, vi elektu la diskojn el la kategorioj dezirataj kaj sendu retmesaĝon al "vinilkosmo@gmail.com" kun via poŝta adreso kaj via mendo kun via kalkulo. Post nia konfirmo al vi laŭ la disponebleco de la diskoj menditaj, vi konfirmos vian subtenan pagon kaj ni sendos la diskojn ...

Kiel sendi vian subtenan pagon ?

1) **Pago per ĉeko** (nur por francoj !) al Vinilkosmo, 2 Bis Chemin du canal, FR-31450 Donneville

2) **Pago per bankĝiro** al Vinilkosmo

Poŝtkonto CCP

IBAN : FR52 2004 1010 1606 7085 7J03 728

BIC /Swift : PSSTFRPPTOU

La banque Postale FR-31900 Toulouse Chèques (konfirmi al ni vian subtenan pagon)

3) **Tra la UEA konto** de Vinilkosmo: vini-j (sendu al ni kopie vian transpagpeton senditan al UEA kiel konfirmilo)

4) **Per kreditkarto tra Paypal** <https://www.paypal.fr/fr> al Vinilkosmo konto cepayment@vinilkosmo.com

Specialajn dankojn ! Ni volas dankegi ĉiujn kiuj sendis al ni kuraĝigajn kaj subtenajn mesaĝojn... tio donis al ni la forton por daŭrigi la laboron en tiom malfacilaj kondiĉoj... Ni ankaŭ volas aparte danki la homojn kiuj helpis fizike por savi la diskojn :

- la fajrobrigadistoj sen kiuj ĉio estintus forbruligita.

- Dankegon al Marion, Christophe, Françoise, Christian Mony, Sylvie R, Marie Odile, Sylvie B, Nevik kaj Xavier kiuj mane helpis por purigi, selekti, malfermi la ujojn, sekigi libretojn kaj reordigi ĉiujn diskojn. Kaj kompreneble grandan dankon al ĉiuj el vi kiuj subtenos nin mendante tiujn savitajn diskojn ...

Nun ni laboras en la urĝo kaj nur jarfine okaze de la inventario ni povos fari precizan bilancon kaj tiam ankaŭ scios la precizan kvanton da diskoj fordetrinitaj. Plej muzike salutas Floréal Martorell, Flo !

KIEN NI IROS ?

26 décembre-2 janvier. Fête de fin d'année au château de Grésillon, à Baugé.

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique26&lang=eo>

**La 97-a
Universala
Kongreso
de
Esperanto
28 julio –
4 aŭgusto
2012,
Hanojo –
Vjetnamio**



8-11 décembre - Lituanie. Journées Zamenhof à Vilnius.

<http://www.esperanto.bydgoszcz.eu/>

9-11 décembre - Allemagne. 53e Session d'étude et fête Zamenhof à Herzberg. <http://esperanto-urbo.de/>

9-11 décembre - Pologne. 12es Journées Zamenhof de Bialystok. <http://www.espero.bialystok.pl/eo/category,7,1.html>

12-18 décembre - Pologne. Journées Zamenhof 2011 et cours international de pédagogie, à Bydgoszcz et Toruń.

<http://www.esperanto.bydgoszcz.eu/>

27 décembre-1 janvier - Pologne. Fête de fin d'année de la jeunesse à Gdansk. <http://jes.pej.pl/2011/>

27 décembre-3 janvier - Allemagne. 28e IF, fête de fin d'année sur le thème du Benelux, à Xanten. <http://www.internacia-festivalo.de/>

27 décembre-3 janvier - Allemagne. 10e NR, fête de fin d'année pour les enfants, les familles et tous les autres, et 3e NIS, fête de fin d'année pour les jeunes et les jeunes adultes, à Butsburg.

<http://www.esperantoland.org/nr/>

<http://www.esperantoland.org/nis/>

28 décembre-2 janvier - Allemagne. Fête de fin d'année alternative à Herzberg.

<http://esperanto-urbo.de/>

26 novembre - Pays-Bas. 35e Journée portes ouvertes au siège d'UEA, à Rotterdam. uea@co.uea.org

Kultura Semajnfino en La Ciotat(13) la 26an kaj 27an de novembro. Kiel kutime nun, amika kaj lernokunveno okazos en La Ciotat, en Maison des Jumelages, kie eblas tranokti, en simplaj sed

komfortaj kondiĉoj. La staĝo proponas al vi tri konversaciajn rondojn, vi do povos elekti vian nivelon (trois niveaux de conversation, à vous de choisir celui qui vous convient) kiujn gvidos

gesinjoroj Villain, kiuj jam multe spertiĝis dum la Mediteraneaj Esperanto-Semajnoj kaj Rolande Cleizergues, kiu paroligos vin surbaze de ludoj. La spertuloj aŭskultos kaj diskutos pri la "Mil unu noktoj", kiun Daniel Moirand estros. Ĉar li jam tradukis la imponan libron, li certe multon povos rakonti. La kursoj okazas sabate de la 10a ĝis la 12a kaj de la 15a ĝis la 18a, kaj dimanĉe de la 9a ĝis la 12a. La


sabata vespero estos dediĉita al Danlando, la lando kie okazis la UK ĉisomere.

Week-end culturel à La Ciotat pour pratiquer la langue internationale entre amis et pendant des cours; trois niveau de conversation, dont un avec jeux. En soirée, présentation du Danemark, ce petit pays de l'Union Européenne où a eu lieu cet été le Mondial de l'Espéranto.

* * * * *

Mediterranea Esperanto-Semajno en les Issambres (83)

de la 26a de februaro ĝis la 3a de marto 2012. (25 février-3 mars. Semaine d'espéranto au soleil, avec des cours de trois niveaux, aux Issambres (83). prezmoni@hotmail.com Kvankam ĉijare ni ŝanĝas la lokon, do ne plu estos en Agay tamen en la sama regiono, la programo daŭre estos alloga: diversnivelaĵoj kursoj gvidataj de spertaj eksterlandanoj, ekskursoj, libro-servo, kulturaj vesperoj kaj evidente konstanta praktikado kun eksterlandanoj. Rapiĉu aliĝi (antaŭ la 1a de



decembro). Nova ttt-ejo por Esperanto-Provence www.esperanto-provence.org.

33a Zamenhofa tago en Avignon (en « Souvine ») KULTURA ESPERANTO-CENTRO de AVIGNON

Dimanĉon la 11an de decembro 2011

Ek de la 9a : akcepto de la partoprenantoj,

10a prelego de Nina Gouriou : « Surrealismo kaj Salvador Dali »,

12a tagmanĝo (16€),

posttagmeze, je la 14a kaj duono, la gruponoj de nia asocio prezentos skeĉojn, poemojn, rakontojn, kantojn.

Aliĝkotizo 5€

Informoj : esperanto-avignon@laposte.net

TIBOR SEKELJ

Unua parto

el http://eo.wikipedia.org/wiki/Tibor_Sekelj

Tibor SEKELJ (foje nomita *Székely Tibor* laŭ la hungara skribmaniero, naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Spišská Sobota en Aŭstrio-Hungario; mortis la 20-an de septembro 1988 en Subotica, Voĵvodino, Jugoslavio) estis hungardevena jugoslava mondcivitano ĵurnalisto, esploristo, verkisto kaj juristo. Li entreprenis ekspediciojn tra Sudameriko, Azio kaj Afriko. Diference de aliaj mondvojaĝantoj kaj esploristoj lia esplorcelo esence ne estis la materiaj aspektoj de la mondo, sed li volis kompreni kaj malkovri la esencon de la homa animo. Kampoj sur kiuj li agis ege sukcese estas multegaj.

Apud la lingvoj hungara kaj serbokroata li interalie parolis ankaŭ la germanan, hispanan, anglan, francan kaj Esperanton. Sekelj estas lerninta ĉirkaŭ 25 lingvojn kaj foje diris ke li konservis kapablon por 9 inter ili.

En 1986 li estis elektita membro de Akademio de Esperanto kaj honora membro de UEA. En 2011 Eŭropa Esperanto-Unio proklamis la jaron 2012 "La Jaro de Tibor Sekelj" pro la 100-jariĝo de lia naskiĝo.

Junaĝo 1912-1939

La patro de Tibor Sekelj estis bestkuracisto kaj la familio



translokiĝis tre ofte. Malmultajn monatojn post la naskiĝo de Tibor ĝi ekloĝis en Cenei en la nuna Rumanio kie Tibor pasigis la dek unuajn jarojn de sia vivo. La hejma lingvo estis la hungara, surstrate oni parolis ankaŭ iun germanan dialekton. La familio ekloĝis en 1922 en Kikinda (*Кикинда*), Serbio, Jugoslavio, kie Tibor eklernis la serbokroatan; li tiam studis la francan kaj eĉ instruis ĝin al siaj kunuloj studinte kelkajn lecionojn pli frue ol ili. Li perfektigis en tiu lingvo kun franca instruistino; de tiam li akiris novan lingvon proksimume ĉiun kvaran jaron. Tie li finis bazan lernejon antaŭ la familio transloĝiĝis en 1926 al Nikšić (*Никшић*), Montenegro, kie li finis gimnazion. Jam en la mezlernejo li ekŝatis montgrimpadon kaj piedirante li transiris la tutan Montenegron. En 1929 li ekvizitis universitaton por studi juron en Zagrebo (Kroatio) kaj diplomiĝis en 1933, kiel unu el la 3 plej junaj studentoj. En tiuj samaj jaroj li ankaŭ lernis pentrarton, skulptadon, la lingvon Esperanto, filmreĝisoradon kaj ĵurnalismon. Per tiu lasta fako li komencis vivteni sin. En 1937 li eklaboris en Zagrebo kiel filmdramaturgo.

Mondvojaĝanto :

De 1939 ĝis sia vivofino Tibor Sekelj estis nelacigebla vojaĝanto. Eĉ se li revenadis al sia hejmlando, la emo esplori novajn landojn kaj konatiĝi kun aliaj homoj igis lin denove ekvojaĝi.

Sudameriko 1939-1954

Vivinte en Zagrebo, en 1939, sopirante al pli vastaj horizontoj li flugis al Argentino, por raporti pri jugoslavaj elmigrintoj. Post du jaroj li sufiĉe regis la hispanan por povi kunlabori en revuoj, kaj mem eldoni monatan revuon dediĉitan al vojaĝoj kaj esploradoj. Pro diversaj cirkonstancoj inter kiuj la dua mondmilito, li restis tie dum 15 jaroj kiel ĵurnalisto kaj esploristo.

1939-1945: Argentino, Akonkagvo

En 1944, sen granda antaŭa montgrimpa sperto, li partoprenis ekspedicion al Akonkagvo la plej alta monto (6 962m) de Ameriko, gviditan de la konata svisgermana montgrimpano Georg Link. Kun la aŭstro Zechner kaj la italo Bertone li atingis la montsupron je la 13a de februaro 1944. La ekspedicio estis drama: kvar el ses junuloj kiuj partoprenis pereis en neĝŝtormo. Iliajn korpojn retrovis 11 monatojn poste dua ekspedicio, kiun Tibor ankaŭ partoprenis, laŭ iniciato de la argentina armeo. Post tiu dua ekspedicio Sekelj aldonis novan ĉapitron al la dua eldono de la jam aperinta " *Tempestad sobre el Aconcagua*", 1944 en kiu li rakontas tiun aventuron. La argentina registaro rekompencis lin per "ora

kondoro" pro meritoj en la ekspedicio, sed li malakceptis la argentinan civitanecon kiun la ŝtatestro Perón persone proponis al li.

1946-47: Mato-Groso

Pro la sukceso de lia unua libro, lia eldonisto instigis lin verki duan, kaj por ke li havu temon, la eldonisto financis per dumil dolaroj ekspedicion, al ne sufiĉe konataj regionoj en la brazilaj praarbaroj en Mato-Groso. Aliĝis al la ekspedicio rusdevena argentinano Meri Reznik al kiu li edziĝis, unu jaron poste. Tibor kaj Meri eksedziĝis post kvin jaroj.

Sekelj pasigis preskaŭ unu jaron en la regiono de la riveroj Aragvajo kaj Rio das Mortes, kiun li kun 30o da homoj kiel unuaj fremduloj transiris kaj eniris la teritorion de agresemaj Ŝavantoj kaj revenis vivantaj. Li tie renkontiĝis kun triboj *Karaĵa* kaj *Ĵavae* kaj kolektis multe da utilaj geografiaj datumoj pri tiu regiono. Lia dua libro "*Por tierra de Indios*" (1946) kiu raportas tiujn travivaĵojn, renkontis grandan sukceson, atingante plurajn eldonojn kaj estis tradukita al multaj lingvoj.

En la somero 1946 li trakrozis Patagonion kun tri gekunuloj : Zechner, Meri kaj d-ino Rosa Scolnik. Dum la sekvintaj jaroj li vizitadis universitaton de Bonaero por aŭskulti prelegojn pri antropologio, etnologio kaj arĥeologio, ne celante diplomiĝi sed nur akiri utilajn sciojn por siaj venontaj ekspedicioj.

1948-49: Bolivio, Ĵivaroj

En 1948 nova ekspedicio kies planita celo estis renkontiĝi kun Ĵivaroj - kiujn li tamen ne sukcesis renkonti-kondukis lin al Bolivio, en kies ĉefurbo li renkontiĝis kun prezidento Enrique Hertzog kiu instigis lin esplori ne jam esploritan regionon de rivero Itenez kiu etendiĝas ĝis Brazilo. Dum tiu vojaĝo li trafis la tribon de la Tuparioj estinte kanibaloj ĝis 5 jarojn antaŭe, kaj kun kiu li vivis 4 monatojn. Reveninte en aprilo 1949, Sekelj ricevis proponon de la prezidento Hertzog administri teritorion centmil-hektaran el la planitaj 4 milionoj da hektaroj por tie loĝigi unu milionon da rifuĝintoj el Eŭropo. Sekelj ne volis atendi ses monatojn ke la parlamento faru decidon kaj rezignis pri la oferto.

1949-1951 Venezuelo

Veninte en Brition al Universala Kongreso de Esperanto en somero de 1949, post sepmonata restado en Eŭropo, Sekelj reiris al Sudameriko, ĉifoje al Venezuelo kie li dum unu jaro kaj duono fariĝis estro de vendejo de muzikinstrumentoj en Marakajbo. Dume li plu verkadis por gazetoj kaj iris al Karakaso por tie realigi serion da murpentraĵoj pri la vivo de Venezuelo por ĵus konstruita kafejo. De tie li ekis vagabondan kaj esploran vojaĝon al Mezamerikaj landoj, estante sola, ĉar li eksedziĝis de Meri post kvinjara kunvivado.

1951-54: Mezameriko

Inter liaj vizitoj en Mezameriko, li menciis viziton al insuloj San Blas ĉe

Panamo kie vivas Indianoj *Kuna*, malsukcesan pro erupcio provon ascendi la vulkanon Izalko en Salvadoro, malkovron de antikva ruinurbo en Honduro, pri kiu ĉiuj konis legendojn sed neniu vidis, kaj kiun konstruis malpli civilizitaj indianoj.

Paralele kun esploradoj, Sekelj sin okupis pri arkeologio kaj antropologio. En Gvatemalo kaj Honduro li pristudis la civilizacion de la Majaoj kaj vizitis preskaŭ ĉiujn arkeologiajn restejojn.

Alveninte en Meksikio en 1953, alpinistaj kluboj invitis lin partopreni ekspediciojn ĉar ili konsideris lin majstro pro lia libro "*Tempestad sobre el Aconcagua*" kiu furore vendiĝis kaj estis konsiderita kiel manlibro pri montgrimpado. Li do surgrimpis Popokatepetlon, Ikstaksiatlon kaj multajn aliajn vulkanojn kaj montojn, kaj tiam vere spertiĝis. Interesa esploro estis trapenetra tra la fluejo de subtera rivero San Heronimo kiu boras al si 14-kman vojon en la interno de monto.

Pluaj mondvojaĝoj baziĝinte el Eŭropo 1954-1988

En 1954 li ekloĝis en Belgrado reveninte al Jugoslavio kie li estis varme akceptita de registaro kaj popolo pro siaj interesaj travivaĵoj kaj homama mesaĝo. Multaj liaj artikoloj aperis en gazetoj kaj pluraj liaj libroj estis tiam tradukitaj al lingvoj serba, slovena, hungara, albana kaj Esperanta.

1956-57: Barato, Ĉinio, Nepalo

En 1956 li ekis vojaĝon al Azio per aŭtomobilo, celante partopreni Unesko-konferencon okazontan en Nov-Delĥio kiel observanto de UEA. Lian aŭton li lasis kolapsita en Teherano kaj daŭrigis sian vojon per buso kaj fervojo. Dum tiu vojaĝo li havis konversaciojn kun ĉefministro Nehru kaj ties filino, estonta ĉefministro Indira Gandhi kaj amikiĝis kun la posta prezidento d-ro Radhakrishnan. En la jugoslava ambasadejo li renkontiĝis kun Ljubomir Vukotić, tiutempe prezidanto de la Mondfederacio de Surduloj kiu tie partoprenis konferencon kun barataj kaj ĉinaj reprezentantoj por starigi azian oficejon. Sekelj helpis al Vukotić kiel interpretisto en tiu malfacila komunika situacio de malsamlingvanoj sen aŭdkapablo. Dum januaro 1957 li sekve akompanis Vukotić al Ĉinio, al kiu tiam ne alvojaĝis turistoj. Sekvas sesmonata restado en Nepalo, alia lando kiu ĝis tiam ne akceptis vizitantojn. La reĝo de Nepalo Mahendra invitis lin por danki al li pri la fondo de la unua popoluniversitato, kaj instruado de Esperanto. Tio estas la temo de lia verko *"Nepalo malfermas la pordon"*, 1959, kiun li originale verkis en Esperanto dum restado en Madraso en suda Barato, dividante sian tempon inter verkado kaj



studado de joga filozofio. Tiu libro tradukiĝis al pluraj lingvoj (inter aliaj: angla, serba, slovena).

Post verkado de tiu libro li ekvizitis Baraton piedirante kaj vojaĝante per busoj de vilaĝo al vilaĝo, de templo al templo. Dum unu monato li restadis en groto kun tri aliaj joganoj.

1958-60: Vinoba Bhave, Japanio, Srilanko

Post sesmonata restado en Eŭropo li denove flugis al Barato por instrui Esperanton al Vinoba Bhave kiu mastris la lingvon post unu monato. Plu vizitinte Baraton dum kvin pliaj monatoj, en marto 1960, li flugis al Japanio. Alveninte senmona li restadis 4 monatojn prelegante en 30 urboj en tuta Japanio, gastigante en Esperantistaj hejmoj. Pro la prelegoj kaj gazetartikoloj li perlaboris sufiĉe por aĉeti flugbileton al Srilanko kaj de tie same al Israelo kaj revene al Jugoslavio.

1961-63: Maroko, "Karavano de Amikeco" en Afriko

En 1961 laŭ invito de marokaj Esperantistoj li vizitis Marokon kaj aliĝis al karavano de Tuaregoj al Saharo. Inter du vojaĝoj li restadis en Belgrado.

En marto 1962 ekveturis al Afriko lia "Karavano de Amikeco", konsistanta el ok homoj el kvar landoj en du terenaj aŭtoj. La vojaĝo daŭris unu jaron kaj atingis Egiption, Sudanon, Etiopion, Somalion, Kenion kaj Tanzanion. Alia dua planita karavano

al aliaj afrikaj landoj ne realiĝis. La celo de la vojaĝo estis rektaj homaj kontaktoj. Dume li surgrimpis Kilimanĝaron, la plej altan pinton de Afriko. Tiu ĉi vojaĝo estas la temo de lia verko "*Ĝambo rafiki*", originale verkita en Esperanto, sed unue aperinta en ties slovena traduko.

1965-66: Rusio, Japanio, Mongolio, Eŭropo

En 1965 celante la UK-on okazontan en Tokio, li flugis tra Rusio (Moskvo) kaj Siberio (Irkucko kaj Ĥabarovsko), trajnis ĝis Nahodka kaj perŝipe atingis Jokohamon. Restinte unu monaton en Japanio li ekreveturis per trajno tra Siberio, sed, tion neplaninte, decidis halti en Mongolio dum tri monatoj, kio en tiu tempo ne estis facila afero, eĉ kun vizo kaj permesoj.

En la sekvantaj jaroj liaj vojaĝceloj estis eŭropaj landoj kiujn li preskaŭ ĉiujn vizitis escepte de Albanio kaj Islando. Apartan atenton ricevis Hispanio kaj Skandinavio.

1970: Aŭstralio, Nov-Zelando, Nov-Gvineo


En 1970 li ekflugis por viziti Aŭstralion, Nov-Zelandon kaj Nov-Gvineon kie li restadis ses monatojn. Li tie surgrimpis monton Kosciuszko. En Nov-Gvineo li renkontiĝis kun popoloj kiuj ĝis tiam havis nur tre malmultajn kontaktojn kun civilizita mondo, kaj spertis kelkajn streĉajn situaciojn. Sed la talento de Sekelj sendube estis lia kapablo elsaviĝi el multaj danĝeraj situacioj (foje kontribuis ankaŭ la ŝanco), adaptiĝi

al tre diversaj moroj kaj kutimoj (precipe manĝokutimoj), kaj interkomunikiĝi kun homoj kun tre diversaj lingvoj. Ke li kapablis lerni pli ol dudek aparte helpis.

1972-1980: Nordameriko, Rusio, Uzbekistano, Niĝerio, Ekvadoro

En 1972 okaze de internacia kongreso de etnologoj en Ĉikago li vizitis orientajn partojn de Kanado kaj Usono. En 1977 okaze de sama aranĝo en Leningrado, li ekis vojaĝon al Uzbekistano kaj Centra Azio. Samjare li partoprenis festivalon de Negraj kaj Afrikaj Kulturoj en Lagos (Niĝerio). En 1978 li denove vizitis kelkajn landojn de Sudameriko, kaj unuafoje estis en Ekvadoro kaj vizitis la Galapagojn.

Tiu dum sia tuta vivo nelacigeble vojaĝanta homo klarigis ke li sukcesis havi rimedojn por siaj vojaĝoj per sia laboro, ĉar li sola plenumis la taskojn de sep homoj : verkisto de artikoloj, filmreĝisoro, kameraisto, helpfilmisto, fotisto, aĉetisto kaj sendisto de etnografiaj objektoj. Tiujn taskojn kutime faras apartaj fakuloj, Sekelj dum siaj



vojaĝoj sola faris ĉiujn tiujn taskojn. Krome, ekzemple vojaĝonte al Aŭstralio, li faris varbaranĝon kun flugkompanio por ricevi biletojn rabatpreze.

Laboro por Esperanto

Sekelj dediĉis grandan parton de sia energio por defendo de Esperanto. Komitatano de UEA ekde 1946, dum pli ol 30 jaroj (kun kelkbara paŭzo kiam li konfliktis kun Ivo Lapenna), pro agado de IOE, li penis partopreni tre multajn Universalajn Kongresojn. Kiel reprezentanto de UEA aŭ de Internacia Komitato por Etnografiaj Muzeoj li partoprenis tre multajn internaciajn konferencojn, kie li ofte estis la sola kiu rekte komprenis ĉiujn parolantojn pro sia kono de pli ol dek lingvoj.

En 1983 li kunfondis EVA (Esperantistan Verkistan Asocion kies unua prezidanto li estis kaj en 1986 li estis elektita membro de la Akademio de Esperanto.

Li eluzis ĉiujn okazojn por pledi por Esperanto, notinde en la internacia verkista asocio PEN kaj ĉe Unesko. En 1985 li estis komisiita de UEA por atingi ke Unesko faru duan rezolucion favoran al Esperanto, kio okazis dum la 27a konferenco okazinta en Sofio.

1972-1988: Direktoro de muzeo en Subotica

Laŭ invito, en 1972, li iĝis direktoro de Urba Muzeo en Subotica (Serbio – Vojvodino) kaj profesie gvidis la muzeon dum 4 jaroj. Jam en la malfrua vivaĝo en la 1970-aj jaroj li

postdiplome studis muzeologion en Zagreba Universitato kaj doktoriĝis pri tio (en 1976) sed preskaŭ tuj poste forlasis sian postenon, ne havinte subtenon por siaj ideoj kaj projektoj. Li partoprenis en monda kongreso de etnografoj en Ĉikago en Usono kaj en Monda kongreso de muzeologoj en Kopenhago, kie li estis elektita sekretario de Internacia Komitato de Muzeologoj, kie li faris aron da iniciatoj interalie pri novtipaj muzeoj kun dioramoj.

En 1985 Tibor konatiĝis kun Erzsébet Sekelj, bibliotekistino, naskita en 1958. Ŝi esperantiĝis en tiu sama jaro. Tibor kaj Erzsébet kunvivis tri jarojn kaj geedziĝis en 1987 en Osijek. Ili kune vizitis tri UK-ojn. Erzsébet partoprenis en redaktado de la vojvodina revuo VELO. Ili komune deziris kompili Esperanto-Serbokroatan vortaron, sed tion jam ili ne sukcesis fini.

Ekde 1972 li vivis en Subotica ĝis sia morto la 20-an de septembro 1988. Li estis entombigita la 23-an de septembro en *Bajsko groblje* (Baja tombejo) en Subotica, kun la plej altaj honoroj flanke de urbo Subotica.

Sur lia tombo, sub bronza bareliefo legeblas jena surskribaĵo en Esperanto:

